

M. 15108: 1-2.

(översätt. 1 sida)

Frankrike

uppt. år 1952

Ivar a° LLF 85 röv. hästhöft och hästslakt m. m.

s. 1-2

*Frankrike*

Arles sur Rhône ( B-du-R) Francujo 25/8-1952

Al Sinjoro Direktoro de la Etnologia Arkivo LUND - Svedujo  
Fingatan **FOLKLIVSARKIVET**

Tre Estimata Sinjoro. *M. 15108* //

Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

Tre volonte mi volas helpi al via tutmonda scienca enketo. Tiucele mi, franclingve, tradukis la kondiĉojn kaj la demandaron. Poste mi sendis ilin al kelgaj bestkuracistoj. Bedaŭrinde mi ne multe sukcesis. Tamen mi traŝonas al vi la respondon kiun faris, nur al la demando N°1, Sinjoro veterinara doktoro Revelin ĉe Arles sur Rh. Jen ĝi!:

"Unua demando- Dum longtempe la ĉevalviando estis konsiderata kiel "malbonkvalita viando. Ĝi estis ĉefe uzata kiel nutraĵo por la homoj ĉ nur ĉe la malriĉaj klasoj. Sed, de proksimume unu jarcento, ĉefe sub la influo de la kuracistaro, la franĉoj multe pli manĝas da ĉevalvian "do, speciale ĉe la centra kaj orienta parto de Franclando."

Nun jen miaj scioj kaj respondo al via unua demando.

Mi estas 68a-jara, kaj mi tre bone memoras ke kiam mi estis infano la ĉevalviando ne multe estis manĝata de la personoj. Oni vendis ĝin por nutri la karmangantajn dombestojn: (hundoj, katoj, bestoj de la zoologiaj ĝardenoj kaj bestarmontrejoj.) -- Tia viando, ĝenerale estis tiu de buĉado de maljunaj bestoj pro tio ĉĉa, malmola, malbongustaj k;t;p. Ĝi ne taŭgis kiel nutraĵo de la homoj. Tre malofte oni povis manĝi ĉevalviandon de junaj ĉevaloj vunditaj dum akcidentoj kiujn oni estis devigataj buĉi. Tiaokaze ĝi estis bongusta.

Dum milito 1914/18 multaj junaj ĉevaloj de la armeoj estis vunditaj kaj pro ŝparo la armeaprovizumistaro ofte manĝigis, al la soldataro, tian ĉevalviandon. Mi mem konatiĝis kun ĝi dum tiutempe kaj tiamaniere. Ĝi estis ŝatata de la soldatoj. Post la milito, la eks-soldatoj volonte aĉtis la ĉevalviandon de junaj bestoj.

Mi neniam aŭdis diri ke, ie ajn, oni bredis la geĉevalojn nur celante nutri la homojn per tia viando.

Dua demando : Mi ne scias pri tio kaj ne povas respondi.

Tria demando : ne povas respondi.

Kvara demando : Pri antaŭa maniero mi ne povas respondi. Nun la geĉevaloj estas ĝenerale mortigitaj ĉe la oficialej buĉejoj kaj la kvalito de la viando estas kontrolata de specialaj oficistoj aŭ de veterinaroj. En la urboj oni ofte portas al la veterinaroj la gekatojn kaj gehundojn por ke li mortigu ilin, rapide kaj sendolore, per venena injektaĵo.

Mi kaptas la okazon de tiu enketo por dankesprimi al via urbo mian koran memoron kiun mi konservas pri via afabla akcepto en 1934, kiam post la antaŭ-kongreso ĉe Malmö la esperantistoj vizitis, karavane, vian interesan universitatan urbon, LUND.

Mi esperas ke esperanto multe faciligis vian enketon kaj mi estus scivolema koni la rezultatojn.

Bonvolu akcepti, tre Estimata Sinjoro, miajn tre sincerajn salutojn.

*Emile Borel*  
Emile BOREL Delegito de U.E.A.  
Av V. Hugo - ARLES SUR RHONE (B-d-R)  
Franclando.



Jag sänder Er det svar, som veterinär dr Revelin har givit  
å fråga nr 1:

1. Under långa tider har hästkött ansetts vara ett kött av sämre kvalitet. Det har i huvudsak använts som föda för människor ur de lägre samhällsklasserna. Men sedan ett århundrade tillbaka har fransmännen, särskilt i de centrala och östra delarna av landet, börjat att äta hästkött i större skala, mycket tack vare läkarkårens inflytande.

Nu blir det mitt vetande och svar på Er första fråga:

1. Jag är 68 år gammal och jag kommer mycket bra ihåg sedan min tid som barn att hästkött inte var mycket använt som föda till människor. Man sålde det för att det skulle användas som föda åt husdjuren, som voro dyra i maten, (hundar, katter, djur från zoologiska trädgårdar o.dyl.) Detta kött var i regel från gamla djur och därför uselt, segt, osmakligt o.s.v., varför det inte dög som människoföda. Mycket sällan kunde man äta köttet från unga djur, som skadats under någon olyckshändelse och som därför nödvändigt måste slaktas. I sådana fall var köttet välsmakande.  
Under kriget 1914-1918 var det många armehästar, som blev skadade och uppättna för att förrådet av soldaternas livsmedel skulle sparas. Jag gjorde själv bekantskap med hästkött under denna tid och på detta sätt. Det var omtyckt av soldaterna. Efter kriget köpte f.d. solater gärna kött av unga hästar.  
Jag hörde aldrig att någon födde upp hästar endast för människoföda.
2. Jag vet ingenting om denna fråga och kan inte svara på den.
3. Jag kan inte svara.
4. De tidigare metoderna känner jag inte. Nu är hästarna i allmänhet avlivade vid offentliga slakthus och kvaliteten å köttet är kontrollerat av särskilda tjänstemän eller veterinärer.  
I städerna bär man ofta katter och hundar till veterinärerna för att de skall avliva dem snabbt och smärtfritt medelst giftinjektion.